

Recenza eseo

Kalman Kalocsay - Gaston Waringhien: *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. Rotterdam 1980: Universala Esperanto-Asocio.

La a toro: [Jouko Lindstedt](#)

- [enerala ojn, "La vorto"](#)
- ["La frazo"](#)
- ["La vortfarado", konkludoj](#)

Unua parto

[Planlingvistiko 1 (1982), p. 10-18.]

Kiel *la gramatiko de Esperanto, Plena Analiza Gramatiko* (mallonge: *PAG*) meritas pli ampleksan recenzon ol povas enhavi unu numero de *PL*. Tial la recenza eseo aperos en tri partoj, el kiuj la unua pritraktos ĝenerala ojn kaj la ĉapitron "La vorto", la dua la ĉapitron "La frazo" kaj la lasta "La vortfaradon", kun kelkaj konkludaj ojn pri la tuta verko.

"Estas iom pli da detaloj, sed temas esence pri la sama afero -- precipe ĉar, post la morto de Kalocsay, mi ne povis, lojale, ĉi tiu." Tiel resumas Gaston Waringhien la diferencon inter *Plena Gramatiko* kaj *PAG* en sia okdekjarfesta intervjuo (*Literatura Foiro* 68, aŭgusto 1981). Do, temas ne pri nova verko, sed pri la kvara eldono de la plej kompleta gramatiko de Esperanto, aperinta unuafoje jam en 1935 en *Literatura Mondo*. La reeldono estis longe atendata, ĉar la sola postmilita eldono de tiu ĉi nemalhavebla konsultilo restis nekompleta.

Estus kompreneble sencece recenzi *PAG*-on en ordinara maniero. Ĉi tiu ja estas la plej kompleta kaj, kiel tute, la plej bona priskribo de Esperanto. Sed tial ĉi tiu fakte estas pritaksebla ankaŭ kiel la enkorpiĝo de la ĉefa fluo en nia gramatika tradicio; se mi do pli sube montros erarojn, mi min direktas ne tiom al Kalocsay kaj Waringhien, kiom al ĉi tiuj Esperanto-gramatikistoj.

La antaŭaj paroloj de la kvar eldonoj de tiu ĉi gramatiko montras, ke la aŭtoroj devis ĉiam klare difini sian starpunkton rilate al la diversaj kontraŭuloj -- ĉi tiuj, kiuj deziris ĉi tiu klarigi per la 16-regula gramatiketo de Zamenhof, aŭ ĉi tiuj, kiuj enkondukis diversajn "ĉermanismojn" gramatikajn en Esperanton. Mi kredas, ke nun oni jam povas klare vidi, kiel utila por la normigo de Esperanto estis tiu konsekvenca linio de Kalocsay kaj Waringhien. Ankaŭ la priskriban kaj preskriban (konstatan kaj leĝodonan) taskojn *PAG* fakte distingas multe pli klare ol normala nacilingva gramatiko. Oni ne povas dubi, ke la verkintojn plurloke efektive gvidis tiu "spirito" de Esperanto, al kiu ili mem volonte apelacias. Des pli bedaŭrinde estas, ke kiel la ĉefan temon de la antaŭaj paroloj de la nuna eldono Waringhien elektis la eksterlason de la moderna lingvistiko. Temas miaopinie pri atako necesa, ĉar neprovokita kaj meminita.

Unue, la modeloj uzataj en la moderna lingvistiko estas celitaj por teoriaj priskriboj; la lingvistoj ĝenerale ne proponas ilin sen ankaŭ al tiaj praktikaj helpiloj, kia PAG unuavice certe estas. Estas do tute senutile, ke en ties antaŭa parolo oni misinformas la publikon pri lingvistiko. Ekzemple, estas erare diri ke "la fundamenta ambicio de ĉiuj skoloj estas fari el ĝi [=lingvistiko] rigore ekzaktan sciencan, espimeblan per algebraj oĵoj"; estas almenaŭ misgvide atribui "strukturismon" al Trubetzkoy kaj "morfemon" al Jakobson; Waringhien rajtas havi "la intiman konvinkon, ke estas neeble redukti al ĉiuj tomataj transponformuloj la senliman kreivecon de la homa spirito", sed egale pensas ankaŭ multaj lingvistoj.

Due, eĉ pli nedefendeble estas ajnigi, ke malakceptante la modernan lingvistikon oni fariĝas teorie ne trala. La antaŭa parolo de la dua eldono, la antaŭaj klopodis "konstrui ĉiun absolutan gramatikon bazitan nur sur la racio"; la dua tiu de la kvara "la celo de nia verko neniam estis la starigo de ĉiuj ajn teorio". Tamen, PAG ja havas sian priskriban modelon, ĉi pli-malpli strikte ligiĝas al unu certa tradicio, nome la gramatika modelo establita en la priskriboj de la klasikaj greka kaj latina. Ke ĝi estas la modelo plej konata al ĉiuj ropanoj, ne faras ĉiujn ĉi neteoria teorio. Plurloke ĉi uzo pozitive kontribuas al la facila komprenebleco de PAG, sed kelkloke ĉi ankaŭ montriĝas vesta oĵtro strikta por Esperanto: ekzemple, la genia tabelvortaro de Zamenhof devas esti disigita en tri partojn diversaj apitrem traktatajn ("Pronomo", "Adjektivo", "Adverbo") por fariĝi la ĉi postuloj de la klasikaj vortklasoj... Feliĉe la klasika gramatiko tiom neglektis la frazanalizon, ke PAG estis libera uzi plurloke (kvankam sporade) sintaksajn argumentojn, kiuj plaŭsus eĉ al la plej modernema lingvisto-transformisto.

La kiel eble plej detala (kaj ofte terure enuiga) klasifiko de la Esperanta lingvomaterialo la ĉi klasika gramatiko povas esti konsiderata kiel ekzemplo de pli ĝenerala malvirto, eĉ roprocentrismo. Ekde la unua eldono, oni baziĝas sur "la ĝeneralaj kutimoj de la ĉi ropanoj lingvoj". Kelkajn kazojn mi montros en la ĉi apitrem traktado; ĉi tie sufiĉu unu ekzemplo: inter la dudeko da festotagoj menciitaj en par. 77 (pri la uzo de la artikolo) troviĝas nur du nekristanaj, *la Unua de Majo* kaj *Ramadano*. Sed certe ne temas pri vera "ĉi ropanoj ovinismo": inter la du mondmilitoj oni ankoraŭ ne parolis pri la Tria Mondo, kaj PAG simple restis iom malmoderna. Malmodernecon mi kulpigus ankaŭ, ekzemple, pro la asertoj, ke oni pli kaj pli forlasas la formon *l'* en ordinara prozo (p. 95); ke oni ne kutimas uzi *sen* kun infinitivo (p. 161 -- tamen, pli "moderna" starpunkto troviĝas sur p. 331); kaj ke la frazo *mi nomiĝas Petro* (anstataŭ *estas nomata*) "ajnias ankoraŭ stranga" (p. 164). Kaj fine, eble oni kulpigu malmodernecon ankaŭ pro tiu milda seksimo, kiu igas la virinon roli, en la ekzemplofrazoj, kiel la stereotipa edzino malparanta monon je vesta oĵoj (p. 96).

Post tiu longeta enkonduko mi transiras al traktado de la unuopaj apitremoj. Sed en ili mi ne tuos tion, kio efektive estas ĉiia plej grava parto: la trezoron de ekzemplaj frazoj, plejparte Zamenhofaj, pri ĉiuj unuopa gramatika ero. Jam pro tiuj ekzemploj indas posedi PAG-on. Oni povas bedaŭri nur, ke la spaco ne sufiĉis por pli detalaj fontindikoj; eĉ la zamenhofa oĵoj oni volonte legus almenaŭ indikon pri la jaro.

La unua parto de la libro nomiĝas "La vorto", kaj ties unua parto estas "Ortografio kaj interpunkcio". Krom la ĝeneralaj reguloj, oni traktas i.a. la nomojn de la literoj en algebraj kaj kemiaj formuloj (sed ne la "telefonajn" literum-nomojn, ekzemple *asfalto*, *barbaro*, *centimetro*...) kaj surogatojn de la supersignojn. La interpunkciaj normoj ajnias al mi raciaj (u

nur pro tio, ke ili koincidas kun la finnaj?). La uzo de la steleto en lingvistiko (p. 35) estas klarigita maluste.

Sekvas la parto "Fonetiko", bedaŭrinde. Bedaŭrinde, ĉi estas preskaŭ ĉisfunde ne ŭsta, diletanta kaj misgvida, sub la nivelo de la cetera verko. Nu, almenaŭ Waringhien jam pli frue ekkonsciis pri iuj tiaj mankoj (vd. la menciitan intervjuon en *Literatura Foiro*), kaj tial mi min detenas dibo ĉi per detaloj. La ĉefa kritikinda o estas, ke oni lasis la ĉapitron eniri en la novan eldonon praktike sen ankaŭ; oni estus devinta forstreki **almenaŭ** la tutan doktrinon pri la du *e* kaj *o* en Esperanto. Feliĉe nune ekzistas multe pli bonaj priskriboj de la Esperanta fonologio (Wells 1978: 15-26 kaj Wood, aperonta).

La plej grandan parton el "La vorto" okupas "Morfologio kaj sinetio", t.e. "la formoj kaj ilia uzado". (La terminon *sinetio* oni uzas nur en PAG; necesigis ĉi ĉefe ties tro strikta difino de, unuflanke, morfologio kaj, aliflanke, sintakso.) Unue oni pritraktas "Vortospecojn kaj vortofunkciojn" en ĉapitro iom konfuza. Temas pri vortoklasoj (substantivo, verbo...) kaj frazelementoj (subjekto, predikato...); la duaj apartenas klare al sintakso, sed pro iu kaŭzo estas traktataj ankaŭ ĉi apatre. La vortoklasoj ("vortospecoj") estas difinitaj laŭ la tradicia nokia metodo, kun iuj ties malfortaj flankoj -- ekzemple, la adjektivo "esprimas ideon pri kvalito" (p. 53), sed ĉu *beleco* ne faras tion, same kiel *stultulo*? Gratulinde trafan analizeron prezentas tamen la klara distingo inter konjunkcioj kaj subjunkcioj (p. 54). La frazelementoj estas klasitaj laŭ sistemo, kies utilon estas malfacile vidi. Ĉi ajnas, ke en *mortas por la patrujo* la sintagmo *por la patrujo* estas "adjekto", dum en *morti por la patrujo* ĉi estas "suplemento" -- kial?

La sekva ĉapitro temas pri "La substantivo". Kritikindas la kelkloka neprecizeco pri la distingo inter nomo kaj ĉia signifo: estas strange diri, ke "la abstraktaj ideoj povas roli kiel komunaj aĵoj kiel propraj nomoj" (p. 59), aĵo paroli pri "la ekzisto de mitologiaj duonhomaj kreaĵoj" (p. 60 -- anstataŭ "la ekzisto de vortoj signifantaj mitologiajn...").

Kiel la signojn de la ina sekso oni mencias *in* kaj *nj*, dum la "vira sekso estas nur negative montrata" (p. 60) -- kio do estas *j*? Oni ja ne povas diri *pa jino*, sekve *j*, male al ekzemple *ul* aĵo *ist*, pozitive entenas la signifon "virsekso". Vane oni serĉas en PAG konsilon pri la plej granda problemo nuntempa en la uzo de *in*: ĉu ĉi estas deviga en vortoj signifantaj profesion aĵo funkcion (*lingvistinoj? protokolkontrolantinoj?*) Kiel prave rimarkigas Wells (1968: 68), oni ne kutime diras *pasa erino* aĵo *viktimino*. Mi volonte akceptus tian evoluon, ke *in* estus **deviga** nur en la nomoj de familianoj (*patrino, onklino* ktp.).

Traktante la pluralon, PAG strange vicigas *ge* kaj *ar* apud la fina o -*j*. Denove rezulto de nokiaj difinoj? Sed se *homaro* estas "pluralo", kial ne ankaŭ *grupo*? Kial oni do ne diras *bravaj grupo?*¹ (Iom simplismaj demandoj, mi konfesas; sed ili montras la miksiĝon de la konceptoj en PAG.) Rilate la kazojn, aldone al la nominativo kaj akuzativo oni en PAG regule uzas "prepozitivo" por la sintagmo "prepozicio + nominativa / akuzativa vorto"; por tio apenaŭ estas motivo, kaj iom ridinda estas la skrupula aldonado de *je X* al la deklinaciaj tabeloj de ĉiu vorto *X* (ekzemple *unu(j)*, *unu(j)*, *je unu(j)*; je l' kukolo! mi emus aldoni...)

Aparta sub ĉapitro traktas la proprajn nomojn. Denove regas nomoj eĉ ropaj: inter la pli ol dudek viraj nomoj troviĝas nur unu ekstere ĉopa, *Konfuceo* (fakte latinisma misformo, se mi ne eraras).

Mal ŝusta estas la klarigo, ke ekzemple rusaj nomoj estas "fonetike transskribataj la la Esp-a alfabeto" (p. 65); tio ja farus el *Tolstoj* "Talstoj", *ajkovskij* "ikofskij", *Evgenij Onegin* "Jivgenij Anjegin". Ke la PAG-a toroj ne ĉifunde pripensis la demandon, montras la pritrakto de la formo *Antoin Mayette*, uzita de prof. Bokarev anstataŭ la ŝusta *Antoine Meillet* (p. 66). La PAG, la nomo estas ĉi tie misformita "tra la rusa, la dire fonetika transskribo (la ŝusta estus: ant an meje)". Nu, la rusa transskribo probable etis ŝuste *Antuan Me(j)e(t)*; la formo *Antoin Mayette* ne rekte respegulas tion, sed estas nur nesukcesa provo diveni la francan skribmanieron la la prononco, kaj tial la eraro de Bokarev ne multe rilatas al la demando. (Cetere, la "fonetika transskribo" de *Bokarev* estus *bakarjof*...)

La apitro "La pronomo" estas relative mallonga kaj ĝenerale klara. Iom strange estas tamen legi, ke *mies*, *vies* ('mia', 'via') estas "teorie eblaj", kvankam neuzataj. La *mi*, e teorie ili ne estas eblaj, almenaŭ en iu racia senco. *Ci* ricevas nur petilliteran traktadon, prave. -- Superflua ĉiujn al mi la zorga distingo de la "posedpronomoj" *la mia*, *la via*... disde la posedaj adjektivoj *mia*, *via*... La kaŭzo de tiu distingo estis ĉiam por mi enigmo, ĉis mi lernis iom da franca gramatiko -- sed en la franca lingvo la koncernaj formoj diferencas ne nur per la uzo de la artikolo. Sendube la uzo de *la* en *la mia* meritas apartan mencion kaj klarigon, sed ĉi nepre ne estas sufiĉa kaŭzo por ĉeti *la mia* en tute alian lokon en la libro ol *mia*.² -- Sur la paĝo 77 oni entabeligas *tiu*j (kaj analoge poste *iu*j, *kiu*j...) kiel la pluralon de pronomo, kies singularoj estas la "individuiga" *tiu* kaj "ne tra" *tio*; sed *tiu*j ja ne povas esti pluralo de la ĉi-lasta, kio montras ke *tiu* kaj *tio* estas du apartaj pronomoj.

En la pritrakto de *ajn* (p. 87) oni ne mencias certan problemon de la Esperanta sintakso, nome kiel esprimi la neon de la frazo

(1) Mi man ĉas ian ajn panon.

Estas ja tiel, ke la frazo

(2) Mi ne man ĉas ian ajn panon.

estas interpretata plej ofte ne kiel neo de (1), sed kiel ekvivalento de *mi man ĉas absolute nenian panon*; por la neo de (1), oni devas diri ekzemple

(3) Ne estas vere, ke mi man ĉas ian ajn panon.

Rimarku, ke (1) pli-malpli samsignifas kun (4), sed (2) tute ne esprimas tion kion (5):

(4) Mi man ĉas ian panon.

(5) Mi ne man ĉas ian panon.

Do, *ajn* ne estas tiom "logika" kiel la Esperantaj funkcivortoj kutimas esti.³

El diversaj specoj de adjektivoj, plej interesa estas la pritrakto de la "determinaj" (p. 94-). La terminologio prezentas kelkajn dubindajn trajtojn -- ekzemple, *multaj homoj* estas ekzemplo de determino **kvalita** (p. 94)! La artikolo estas trafe karakterizata "speco de malforta demonstrativo"

(sed nekonsekvence el la vidpunkto de la PAG-a terminologio, ar demonstrativoj estas nur memstaraj pronomoj, ne montraj adjektivoj).

Kun la artikolreguloj de PAG mi povas ĝenerale konsenti. Mirigas tamen la iom absoluta regulo, la kiu *la* estas iam bezonata antaŭ "ad-substantivo [...] determinita per *de*-prepozitivo", ekzemple *min tre agrezus la perdi o de letero*. Kiel parolanto de senartikola lingvo, mi malfacile akceptas tiajn pure gramatikajn, aŭ tomatajn uzojn de *la*;⁴ por mi estas malfacile diri *min tre ojigus la vizito de Linda*, kun la artikolo, se la vizito estas nek antaŭe priparolita nek iom antaŭe videbla. Povas esti, ke mia lingva sento estas ĉi-loke tro individua; sed ĉi tamen faras la uzon de *la* antaŭ "ad-substantivoj" pli laŭ la normalaj artikolreguloj. Ĉi ankaŭ trovas proksimuman paralelaŭon en almenaŭ unu artikollingvo, la bulgara, kie simila determino neniel neprigas uzon de la difina artikolo (...aŭ mi do devus diri "la uzon de..."?).

Ĝajnas al mi, ke ankaŭ la PAG-verkintoj kelkfoje tro streĉis sian intuicion. Sur la paĝoj 100-101 oni asertas, ke antaŭ propra nomo montra adjektivo akiras "nuancon de ĉi-to [...] aŭ mal ĉi-to"; sed en *tiu Johano, pri kiu mi parolis* estas malfacile vidi tian devigan afekcion. Laŭ la paĝo 106, *iu* en la frazo *mi ricevis iun libron de mia amiko* "neprigas posedan rilaton" (kontraŭ la interpreto "mi ricevis de mia amiko iun libron"); mi kontentiĝus diri, ke ĉi faras tiun interpreton nur pli probable ol la alternativa.

Pli detalane komenton postulas la PAG-a pritrakto de *iu/unu*. PAG prave konstata, ke ĉe Zamenhof *unu* determinis substantivojn montrantajn tiajn aferojn, kiujn "la parolanto konas kaj povus nomi, sed la alparolato ne"; *iu* signifas, ke la "koncerna afero ankaŭ de la parolanto ne estas konata" kaj proksimume egalas al forlaso de determinilo (...*la* forlaso"? Mi ne konsentas!). Bone, sed poste PAG (kiel ankaŭ PIV) komplete kapitulacas: tiuj determiniloj ne plu estas tiel uzataj, la zamenhofsistemo estas fremda al la nuna lingvo. Certe la distingo ne estas tute konsekvence farata, sed mi kredas ke ne estas nur influo de la finna (kies sistemo ĉe ne estas tute simila) ke mi kutimis fari ĉi jam antaŭ ol mi eksciis ke ĉi estas "zamenhofa". Origine *unu* kaj *iu* indikas ambaŭ nedifinecon, sed nur *iu* signifas nespecifecon: ĉe *unu* la signifato estas nedifinita, tamen specifa. Por iom klarigi niajn pensojn, ni konsideru la frazon

(6) ĉi vespere cikonio sidiĝas sur nian futubon.

En (6), la cikonio estas unufoje priparolata kaj tial certe nedifinita. Sed tamen povas temi aŭ pri unu certa specifa cikonio, do ĉi vespere pri la sama, aŭ povas esti tiel, ke ĉi vespere venas nur ĉi cikonio, eble ĉi foje nova -- ankaŭ tiam la frazo veras. Ĉi tamen (aŭ simila) diferencon Zamenhof esprimis per la distingo *unu/iu*. Ver ĉi ajne en (6) ili tamen ne klare indikas, kiun interpreton oni precize celas, sed mi supozas, ke ĉe en la nuntempa Esperanto la frazoj (7) kaj (8) impresas pli nature ol (7') kaj (8'):

(7) Ekzistas unu verkisto, kiun mi ofte forgesas: Jean Forge.

(8) Ekzistas ĉi verkisto, kiun mi ofte forgesas; ĉe nun mi ne povas memori, pri kiu temas.

(7') Ekzistas ĉi verkisto, kiun mi ofte forgesas: Jean Forge.

(8') Ekzistas unu verkisto, kiun mi ofte forgesas; ĉe nun mi ne povas memori, pri kiu temas.

Sed kion diras via lingvosento? La *la mia*, en (8') *unu* havas pli multe numeralan signifon, en (7) pli specifigan, kaj (7') sonas iom nekonsekvence (escepte se la parolanto ekmemoris la nomon proksimume *e* la dupunkto).

La apitro pri numeraloj enhavas trafe formulitajn argumentojn por pravigi la akuzativon en *ili man is irka (po, is, super) ses pladojn*. Sed tro strikta ajnas al mi (p. 114) la malpermeso diri *po glaseton*, precipe ar i kondukas al la malpermeso de *po milionon da...*; la rekomenditan *poan milionon da* mi neniam renkontis. -- Stranga eltrova o estas la "reciproka distribuo" de la tipo *mi donis po tri pomojn al po du infanoj* (p. 114-115). Ne mirige, ke "mankas zamenhofa ekzemplo".

En "La adverbo", PAG subite alprenas historian vidpunkton: *-a* -adverboj ekzistas ar Zamenhof, "prave a malprave", opniis tian fina on utila (p. 121), kaj kelkaj aliaj naski is kiam li "lasis kelkajn adverbojn en ilia nacilingva formo" (p. 123); sed u *tuj, u, e, ju* estas lasitaj en nacilingva formo? (Mi supozas, ke la svedan *ju* Zamenhof ne konis.) -- Sur pa o 118 oni diras, ke "kial estas nur demanda adverbo", sed *tuj* poste la zamenhofa ekzemplo *klarigi la motivojn, kial ni in ne efektivigas* montras klare relativecan uzon (alie estus, se *motivojn* mankus).

Sur la pa o 125 oni atentigas, ke "*nura* ne signifas *sola, unusola, unika*". Mi volonte konsentas, sed konstatas anka , ke tia uzo de *nura* estas tre ofta en parolata lingvo kaj en teli as kelkfoje e en la plej zorge redaktitajn perioda ojn. Mi ne scias, u influas ia "falsa logiko", u la modelo de *ununura*, u tiu de la angla *only* (1. 'nur', 2. '(la) sola'). Povas esti, ke la normo devos cedi kiel okazis e *ati*; la problemo estas, ke tiam oni devus trovi tute novan vorton por esprimi la malnovan signifon de *nura*. Ekzemple *pura* estus tro nepreciza ekvivalento de la angla *mere* kaj samsignifaj vortoj en aliaj lingvoj (?*la pura bleko de leono timigas iujn bestojn*). Tial mi persone esperas, ke PAG estos obeata i-punkte.

En la apitro pri la verbo kvaza kulminas la efa trajto de PAG: admirinde detala kaj sentema analizo en konfuza vesto. La problemo *ata/ita* estas kompreneble solvita "itisme", ar la lingvo in tiel solvis jam anta ol la fama disputo ekestis; sed oni maskas la veran naturon de tiu solvo, nome ke aspektaj trajtoj interplekti as kun la tempaj (pro certaj lingvaj universaloj, la mia opinio).

"Aspektoj", la PAG, estas la kvin deriva o-tipoj "komenca" (*ekvidi*), "momenta", "da ra" (*sidadi*), "ripeta" (*relegi*) kaj fina (*eltrinki glason*). Nu, iuj i ne estas aspektoj, sed io kion certaj franclingvaj gramatikistoj tiel nomas, dum la ermana kaj slava lingvistikoj jam de pluraj jardekoj distingas ilin disde veraj aspektoj kiel "agmanierojn" (germane singulare *Aktionsart*, ruse *sposob dejstvija*, bulgare *na in na dejstvie*).⁵ Tipaj agmanieroj estas precipe la da ra, ripeta kaj momenta; e la komenca kaj (en PAG preterpase menciita) esa temas pri la fazeco de la ago, kaj la "fina aspekto" estas specifa eco de "telaj" verboj. Mi ne postulas, ke normala referenc-gramatiko de Esperanto utiligu iujn i terminojn; sed kono de la teoria fono pliklarigus la pritrakton. Tiam oni evitus anka la strangan franca on nomi "ripeta" la agmanieron kie "la koncerna ago estas farita unu fojon plie" (*relegi, rediri*; p. 141). Des pli miriga difino, ar sur p. 133 trovi as la usta: "oni prezentas la agon kiel plurfoje rekomenci intan kaj ripetitan"; ustaj ekzemploj estus do *batadi, etadi*, kiuj -- ho ve -- trovi as sub la "da ra aspekto".

La verbaj vojoj estas la PAG kvar: aktiva (*man as*), pasiva (*estas man ata*), mediala (*man i as*) kaj faktitiva (*man igas*). Tiu analizo ne estas sen avantaĵoj, ĉar ĝi emfazas la specialan rolon de *ig* kaj *i* kiel iloj pli sintaksaj ol vortfaraj. Sed aliflanke, ĉi tiu estas la nesimetrieco de la sistemo: ekzistas aparta pasivo de faktitivo (*estas man igata*), kaj *fini as* certe ne estas malpli aktivvojo ol *esas*. Per transformeca analizo oni eble povus pli elegante priskribi la aferon, des pli ke la analizo de PAG jam kelkloke similas al tia.

La mallongaj apitroj pri la prepozicioj, konjunkcioj kaj subjunkcioj apenaŭ prezentas ion kritikindan. Pli interesa estas "La interjekcioj". Kiel en la nacilingvaj gramatikoj, temas pri la "lasta" vortklaso; sed en internacia lingvo prezenti ĉi tiujn specialajn problemojn, kiujn PAG ĉi tiujn pretervidi. Unue, la "internacieco" mem. La PAG (p. 175), la uzo de *aj* en la senco de *hura!* estas "tute ne internacia" -- ĉu ni devas subkompreni, ke ĝenerale la Esperantaj interjekcioj tamen estas pli-malpli internaciaj? Nu, sendube pluraj el la listigitaj de PAG interjekcioj estas konataj ankaŭ por finno; sed por *ho!* tiu diras *oi!* [oj] (aŭ nenion) kaj por *ba, fi, fu* respektive *pyh, hyi, huh*. *Huj* estas por Esperantisto (ĉu do?) "subita sufero", dum la finna *huj* estas krio de subita ekstim(et)o (la ekzemple frazo *huj, huj! mi havas spasmon* sonas sufiĉe ridinda por finno), kaj la rusa *huj* estas pura sakra oĉo (ĉi tiu estas la preciza traduko de *kaco*, kvankam la prudaj rusaj vortaroj ne kutimas ĉi tiu listigi).⁶ La Esperanta kaj bulgaraj *ej*-oj estas du tute malsamaj aferoj.

Mi ne scias, kiel facile ekzemple japano orientiĝas en la signifoj de la Esperantaj interjekcioj, sed ĉi tiu estas fonetiko PAG lasas lin ĉi tiu pli senhelpa. Pluraj interjekcioj prezentas nur konvencian manieron skribi diversajn kriojn kaj gruntojn, kies efektiva fonetiko povas forte diferencii de tiu de la normalaj vortoj. La laciĝo-esprimoj *uf!* *uff!*, eble ankaŭ *fu!*, fakte reprezentas diversajn krombruojn de anhelado, ekzemple [7], sed tio ne estas klara per si mem. *Ts!* oni uzas zamenhofe kaj por silentigi kaj por "alvoki knabon, gazeto-vendiston ktp."; la elparolo [ts] ĉi tiu ajnas al mi tute tro malsonora por la dua uzo, kaj mi supozas ke oni ĉi tiu tie celas dentalan avulsivon (kies konvencia angla skribmaniero estas *tsk!*). Kaj kiu divenus, ke *tpr!* (por haltigi ĉevalon) kaj *brr!* (por montri frostiĝon) efektive povas soni idente (kiel bilabiala tremulanto)! Pli konfuzon montras, ke la unua estas en PAG glosita "por **eksciti** ĉevalon"; PIV scias pli ĉi tiu: "rusa interj., por kvietigi ĉevalojn". Do, apenaŭ oni povas diri ke *tpr!* estas Esperanta interjekcio.

En la venonta parto mi pritraktos la apitron "La frazo."

BIBLIOGRAFIO

Wells, John 1978: *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

Wood, Richard E. (aperonta⁸): "Sketch of Esperanto Orthoepy." En David L. Gold (red.): *Advances in the Creation of Orthoepies* (provizora titolo). Mouton.

Dua parto

[Planlingvistiko 3 (1982), p. 13-19.]

Pritraktante sintakson, t.e. la parton de la gramatiko kiu studas la frazostukturon, *Plena Analiza Gramatiko* eniras terenon kie la gramatika tradicio donas malpli da vojontriloj ol en morfologio. La tradicio liveras ĉefe nur diversajn klasifikajn skemojn, kaj ankaŭ la sintakso de PAG konsistas el plej diversaj grupigoj -- grupigoj de frazelementoj kaj propozicioj laŭ variaj kriterioj. Verdire la tuto ne prezentas tre interesan legaĵon ĉar por lingvisto-fakulo, sed en pluraj detaloj Kalocsay kaj Waringhien tamen reprovigas sian talenton kapti la esencon de lingvaj fenomenoj.

La sintakso estas dividita en tri partojn: "vortsintakso", "propozicio-sintakso" kaj "frazsintakso". Kvankam la aŭtoroj ja ne metas modernajn terminojn, indas atentigi ke tiu divido bele respondas al la bazaj konceptoj de la nuntempaj lingvistikaj sintakso-modeloj. La "vortsintakso" identas kun la nivelo de sintagmoj (angle *phrases*), la "propozicio-sintakso" evidente studas la simplan frazon kaj la "frazsintakso" frazojn kompleksajn. Interne de la "vortsintakso", ekzemple la subkapitolo "Substantiva kerno-vorto" studas la strukturon de la substantiva sintagmo, alinome substantiva grupo. Alia afero estas, ke en la moderna sintakso oni ne emas tiel strikte apartigi la diversajn nivelojn kiel oni faras en PAG; precipe la distingo inter simpla kaj kompleksa frazoj estas nur supraŭta kaj devigas pritrakti en malsamaj lokoj, unuflanke, adjektojn konsistantajn el unuopaj vortoj aŭ vortgrupoj kaj, aliflanke, adjektojn-frazojn.

Ĝenerale ankaŭ en ĉi tiu parto de PAG regas nociismaj difinoj. Ili kompreneble ne malhelpas la priskribon de la faktoj, sed kelkfoje ilia neprecizeco estas iom ĉena.

"Propozicio estas esence la lingva formo por esprimi la plej simplan agon de la spirito: la juĝon" (p. 214) -- tio evidente validas nur pri certaj deklaraj propozicioj, kaj mi ankaŭ supozas ke la homa menso kapablas je ĉi pli simplaj agoj ol juĝoj.

"*Frazo* estas esence dismeto de *sence kompleta, memstara* kompleksa koncepto en sintakse interrilatantajn detalkonceptojn" (p. 290, originala emfazo): tie oni difinas la frazon helpe de sintakso, kvankam evidente sintakso devus esti difinita helpe de la frazo; krome mankas kriterioj por la "senca kompleteco" aŭ "memstareco" de koncepto -- verŝajne oni ne povus ilin difini sen denove reveni al la frazo!

Laŭ la paĝo 215, subjekto estas "io, pri kio oni asertas ion", kaj predikato "tio, kion oni asertas pri ĉi"; legate laŭ litero tiu difino farus el subjekto estaĵon en la reala mondo, dum oni evidente celas la **vorton** kiu montras al tiu estaĵo. Sed ankaŭ ĉetero la difinoj estas malustaj -- konsideru ĉi tiun simplan frazon:

(1) *Kalevala*-n tradukis J. E. Leppakoski.

Ĉi tie oni klare asertas ion pri *Kalevala*, tamen la koncerna vorto egale klare estas objekto, ne la subjekto de la frazo. La "kion oni diras pri kio"-rilato ja estas tute egala al tiu en la frazo (2):

(2) *Kalevala* estas tradukita de J. E. Leppakoski.

En la praktiko la PAG-a toroj kompreneble ne miksas la subjektojn kaj objektojn, ar ili uzas formalajn kriteriojn (la kazon, ekzemple) por distingi ilin. Des pli senutile estas do doni nociismajn ajndifinojn.

Alia trajto menciita jam en la unua parto de la recenzo ripeti as anka en sintakso, sed i-foje temas pri trajto la dinda: la abunda uzo de Zamenhofaj ekzemploj. (La la indekso, mencioj de Lazaro Zamenhof trovi as "sur iu pa o", kaj tio probable veras preska la vorte). Kiel mian modestan kontribuon mi aldonas, ke la strukture iom nekutima deriva o *kuntara* (p . 199) devus evidente porti la signon "Z", almena se PIV pravas. Mi anka havas etan dubon pri la a tenteco de la ekzakta formo de kelkaj Z-aj ekzemploj: la la pa o 253, *esti tombisto tridek jarojn* estas "Z", la la pa o 267, tia estas *mi tridek jarojn estas tombisto*; se amba venas el la sama loko de la Z-a verkaro, tio montras ke ne iuj ekzemploj estas cititaj en sia originala formo. Kompreneble mi ne suspektas, ke PAG intence misgvidas la leganton en tiu punkto.

La frazelementoj kaj diversaj fraztipoj estas en PAG klasitaj kaj la la formo kaj la la funkcio, efe tamen la la funkcio kaj senco. Mi suspektas ke tio malpliigas la valoron de la libro kiel referenca verko, ar oni devas bone posedi la terminologion uzatan de la a toroj por scii, kie trovi as informoj ekzemple pri la uzo de *kvankam*. Feli e la alfabeto indekso de la libro povas helpi, tamen mi supozas ke grupigo la diversaj konjunkcioj, subjunkcioj kaj prepozicioj estus almena en certaj partoj konsiderinda alternativo. iukaze mi prezentos en la sekvo kelkajn komentojn la la klasifika sistemo de la verko mem.

La apitro pri "Substantiva kerno-vorto" enhavas tre fajnan klasifikon de la "Substantiva epiteto", t.e. de konstruoj kie du substantivoj staras unu apud la alia. La klasifiko estas tiel fajna ke denove mi dubas u oni povas praktike uzi in -- estas nebone, se ni devas unue studi la sencologikon proponatan de PAG por simple trovi la regulon, kiam la du substantivoj kaze akordas unu kun la alia. En "Suplementoj de A -substantivo" oni same energie klasas diversajn determinantojn ligi antajn al substantivo helpe de prepozicio. Ekzemple *X de Y* indikas poseda on, alligita on, parton, membron, kvaliton, staton, "specialan konsideron", originon, "art-a produktspecon", konsiston, mezuron kaj certe ankora ion. io i miaopinie tute ne apartenas al sintakso, sed al la vortaraj eroj de la koncernaj prepozicioj (la tradicia sintakso beda rinde ofte faras el sintakso leksikologion de la funkcivortoj). Kaj e se i apartenus al sintakso, estus erare trakti kiel multsignifecon ion kio evidente estas vastsignifeco: *de* ne portas en si tian legion de diversaj sencoj, i simple estas sufi e nepreciza por esprimi uzon en variaj funkcioj. Se oni atente legas la liston de la signifoj kiujn povas indiki "suplemento de priskribo" (p . 195), oni fakte rimarkas ke i estas resumebla simple "indikas ion ajn, depende de la prepozicio uzata". Flanka rimarko: sur la pa o 193 staras (kiel ekzemplo de "alligita o") la esprimo *la golfo de Helsinki*, sed tia geografia objekto tute ne ekzistas (fakte e ne ekzistas iu golfo kiun oni povus nature renomi tiel -- eble oni simple miksis Helsinkon kun iu alia baltmara urbo?).

La la pa o 200, suplemento kun prepozicio enerale ne povas esti esprimita per unu vorto havanta la prepozicion kiel prefikson, sed "sola escepto estas, se la kunmeto estas tiel kutima, ke i ajnas kvaza radikvorto: *senhuffera evalo*." ajnas, ke PAG tro penadas por trovi klarigojn por io: *senhuffera* apena estas tiom iutaga vorto en Esperanto -- probable temas pri tio, ke i estas mallonga kaj havas modelon en multaj aliaj *sen*-deriva oj. Cetere: u la a toroj mem elpensis tiun ekzemplon?

Pri la apitroj traktantaj adjektivajn, adverbajn kaj verbajn kernovortojn mi ne trovis multon por rimarkigi. Oni rimarkas, ke ekzemple la "adjektoj" de predikata verbo an i as en "suplementojn" se la verbo estas farita infinitiva a participa. (Tiun fakton mi notis jam en la unua parto de mia recenzo, sed ar ne iuj in kredis, mi invitas la leganton mem konsulti ekzemple la paragrafon 150 de PAG por certi i pri tiu -- miaopinie arbitra -- diferencigo.)

La apitro "Propozicio-sintakso" enhavas i.a. detalan klarigon pri la uzo de la refleksivaj *si* kaj *sia*. La priskribo ajnas al mi nekontesteble usta, sed mi esperas ke iu lerta pedagogo sukcesos esprimi la samon pli koncize -- se i entute estas esprimebla koncize, kompreneble. Sur la pa o 221 oni asertas, ke dum la Esperanta refleksivo rilatas al la subjekto de la plej proksima esprimita ago, tiu "en la aliaj lingvoj" enerale rilatas al la subjekto de la tuta propozicio. Mi suspektas, ke i tie oni komparas detalan analizon de Esperanto kun elementaj gramatikoj de aliaj lingvoj -- mia impresio estas, ke en pluraj lingvoj la refleksivo kondukas sammaniere kiel en Esperanto, kvankam al la lernantoj oni emas doni simpligitajn regulojn. (Estas interese noti, ke la termino *refleksivo*, propre nomo de certa subklaso de vortoj, fakte uzi as kiel nomo de certa sintaksa fenomeno -- tute kiel en la transformata gramatiko kie i estas nomo de unu transformata regulo enmetanta refleksivajn pronomojn en la frazon sub difinitaj kondi ojn.)

En la diversaj paragrafoj traktantaj la uzon de prepozicioj (kvankam iliaj titoloj ne estas tiuindikaj) mi notis kelkajn punktojn de malkonsento -- konfesinde, plejparte nur pri detaloj. Sur la pa o 258 mi mirigas la kategoriaj informoj ke oni diras *sur se o* sed *en apgose o*, a ke la Z-a konsilo diri *lo i e la strato N.* "apena estas obeata" (la rekomendata *lo i en strato* ajnas al mi influo de certaj naciaj lingvoj). La reguloj en la 193a paragrafo pri la uzo de prepozicioj en temp-indikoj komplikigas simplan aferon -- kiu elpensis la regulon, ke ekzemple festotagoj postulas la prepozicion *je*? Sur la pa o 204 oni atribuas al la miaopinie klara kaj simpla esprimo *kuri trans la straton* signifon, kiu estas tro longa por esti citita i tie. La la pa o 204, e landnomoj *mia voja o Hispanujon* estas preferata al *mia voja o Hispanujen*, sed amba esprimmanieroj ajnas al mi maloftaj, kaj mi emus veti por la dua. Certe erara estas la informo sur la p . 260, ke "nun oni ... plivole diras 'iri lernejon' ol 'iri al lernejo'". Mi vetas por la ordo 1. *iri al lernejo*, 2. *iri lernejen*, 3. *iri lernejon*. Sed i tiun prepozician kritikon mi finu per la do: la paragrafo 286, komparanta diverstipajn adjektojn kiuj havas paralelajn signifojn kaj aran i as per similaj prepozicioj, estas juveleto kiu rekte rilatas al la kazgramatikaj teorioj en enerala lingvistiko.

La pasinteca kondicionalo (tipo *estus farinta*) ricevas diversloke iom kontra dirajn traktojn. Unue oni diras jene: "Z. kaj slavaj verkistoj ofte uzas kondicionalon simplan anstata perfektan. Tio neniel estas aprobebla, ar i ofte estigas konfuzon pri la tempo" (p . 335). Sed iom pli poste: "Uzante kondicionalon, oni povas uzi la simplan formon, la la ekzemplo de Zamenhof kaj aliaj a toroj. Tio devenas el tio, ke oni penas eviti en E-o la kompleksajn verboformojn, kaj prefere rigardas la kondicionalon simpla resuma formo por iuj tri tempoj" (p . 359). Mi mem inklinas al la dua opinio, precipe en la esprimoj de la tipo *estus povinta fari*, kie la kondicionalo kondi igas ne la povadon sed nur la utiligadon de i (p . 274).

La la pa o 304 (kaj 289) oni povas distingi inter la rilat-pronoma kaj depend-demanda *kiu* per tio, ke post la unua neniam povas stari *do*: ..., *kiu do estas tie* povus esti nur dependa demando,

ne epiteta propozicio. Sed sur la paĝo 241 PAG mem skribas "Tiujn verbojn, ĉe kiuj do la speco de la objektoj libere alternas, oni povas nomi...".

La apitro pri "frazsintakso", t.e. konstruo de kompleksaj frazoj el simplaj propozicioj, montras la plej akutan mankon de ĉi tiu teoria kadro. Malgraŭ tio, la PAG-a toro ĝenerale bone elturniĝas. La subapitroj "Verbotempoj en subpropozicioj" kaj "Vortordo" povas tamen apena esti nomataj definitivaj pritraktoj de la koncernaj temoj: al ambaŭ mankas bazaj terminoj kaj konceptoj, per kiuj oni ordigu la unuavide ĉiosan kolekton de faktoj kaj detalreguloj. La dinde estas, ke kelkloke Waringhien pretis anĉi la opiniojn esprimatajn en la antaŭaj eldonoj, se tio montriĝis motivita (ofte influis H. A. de Hoog, kiu post Zamenhof estas la plej citita gramatikisto en PAG). Tiaj anĉoj okazis ĉe *kia/kiel* en komparaj subpropozicioj (p. 342), en permeso de "la unua fojo *ke*" kaj en la konstruoj de la tipo *kiel vi deziras, ke mi agu?* (p. 305). La PAG-a priskribo de la ĉi-lasta estas tiom komplika ("la eksplika kompletivo estas interplektita kun demanda propozicio aŭ subpropozicio (epiteta aŭ adjekta), tiel ke du prop-oj kvazaŭ reciproke subordiĝas unu al la alia. Tiaokaze, nome, la demandvorto aŭ la subjunkcio de la unua prop-o estas samtempe la objekto aŭ adjekto de la dua"), ke almenaŭ mi preferas la riproĉatan terminologion de la moderna lingvistiko (oni povus diri: "demanda aŭ relativa frazelemento povas esti levita el la subordita en la superorditan frazon").

Multloke oni tuas apitu ĉi tiu certan neesploritan demandon de la Esperanta sintakso. Temas pri tio, kiu el la sekvaj frazoj estas korekta:

- (3) Ovojn ili ĉatas manĉi kuiritaj.
- (4) Ovojn ili ĉatas manĉi kuiritajn.

Ofte oni trovas la akuzativan solvon (4) ĉe bonaj verkistoj, ekzemple *Oni trovis Ospacin mortan* (Johan Valano). Jen simila ekzemplo el *Monato: ĉi tiu humanisma edukiĝo rilatigis inĉi jam junan kun la antikvaj kulturo kaj literaturo*. Rimarku, ke *Oni trovis Ospacin morta* signifus alian aferon, kaj ke en (3) nur la semantiko malebligas nin konsideri la manĉantojn kuiritaj (kp. *Ovojn ili manĉas nur devigataj*). Aliflanke, la nominativa solvo (3) ne estas malofta: *Oni trinku inĉi varma* (el *Asteriks la gaĉlo*). PAG vere ne metas la demandon ĉi tiel (ĉi tiu ne konscias pri la problemo), sed ĉi tiu klare alvenas al la nominativa solvo. La PAG, en la frazo

- (5) ĉi tiu dancas nuda.

-- kiu ĉetere estas la favorata ekzemplofrazo ankaŭ en studoj pri similaj frazelementoj en la angla -- *nuda* estas parenca al "stat-adjektoj" sed estas tamen predikativo (adjekta predikativo, p. 268-269). Kaj la kazo de predikativo ja estas nominativo ankaŭ kiam ĉi tiu rilatas al la objekto, do: *mi resendis la varon tiam, kiam mi ĉi tiu ricevis* (p. 332; similaj ekzemploj troviĝas sur p. 237, ankaŭ Zamenhofaj). Tamen, sur la paĝo 228 legeblas, "ke en tre maloftaj kazoj Z. uzas la refleksivon **solan**" (mia emfazo): evidente la postulo de klareco ĉi tiu tie superis teoriomadon, kiu miaopinie estas ankaŭ principe malĉusta. Oni simple devus agnoski ke ankaŭ adjektivo povas esti adjekto kaj ke ĉi tiu tiam akordiĝas kun la vorto al kiu ĉi tiu (nerekte) rilatas. ĉi tiu adjektivo-tipo povas ja ligiĝi al ĉi tiuj verboj, dum la predikativo tradicie staras nur apud membroj de certa limigita verboklaso (*esti, ajni, fari ĉi tiu; konsideri, rigardi, fari* kaj kelkaj aliaj). Kaj ĉi tiuokaze la afero meritas pli atentan studadon kaj kolektadon de ekzemploj.

ar temas pri gramatiko, oni eble permesas ke la recenzanto fine indiku ankaŭ kelkan lingvajn erarojn. "La kaŭzo estas, ĉar..." sonas nebone (p. 205). Sur p. 215 *epoko* estas uzata en la senco de *tempo(punkto)*. Sur p. 349, plej supera linio, mankas akuzativo.

En la lasta parto de ĉi tiu recenzo (kiu bedaŭrinde ŝoviĝos al la venonta jarkolekto) mi traktos la vortfaradon.

Tria parto

[Planlingvistiko 6 (1983), p. 7-14.]

La tria kaj lasta ĉefparto de PAG temas pri vortfarado. La vortfarada sistemo de Esperanto estas sendube unika o inter la lingvoj de la mondo, eĉ se oni ne atribuas al ĉi tiajn mistikajn ecojn de maksimumaj elasteco kaj logikeco pri kiuj oni kelkfoje povas legi. (Almenaŭ la aŭtoroj de PAG konscias ke la sistemo enhavas multajn esceptojn kaj nesimetriaĵojn, kvankam ili emfazas ĉian bazan "superecon" kompare kun la naciaj lingvoj.) Tial la studo de tiu parto de la Esperanta gramatiko povus multon doni al ĝenerala lingvistiko: Esperanto ja estas giganta lingvistika eksperimento, kaj la plej interesa trajto eksperimentata, tuj post la diaspora socia bazo, estas sendube la maksimume produktiva derivmorfologio.

Sed bedaŭrinde la unikeco de la vortfara sistemo kaŭzas ankaŭ tion, ke nek la okcidenta gramatika tradicio nek la pli modernaj metodoj lingvistikaj povas proponi ĉian modelon por ĉi tiu priskribo. Tial ankaŭ PAG ne povas ne uzi originalan analiz-metodon ĉi-kampe. Sed originalaj metodoj povas esti pli aŭ malpli sukcesaj, pli aŭ malpli konformaj al la ĝeneralaj principoj de lingvo-priskribo -- ne indas esti tro originala. Mia impresio estas, ke la analizo de Kalocsay kaj Waringhien ne estas tia, kian farus profesia lingvisto. Mi scias, ke por ili tio ne estas riproĉo, kaj ke kiel lingvisto mi estas danke inklina supertaksi la valoron de la metodoj instruitaj al mi. Sed ankaŭ en ĉi tiu parto de mia recenzo mi tamen vokas PAG-on al mia propra ludkampoj kaj kritikoj ĉin el la vidpunkto lingvistika -- ne forgesante la nekritikeblan monumentecon de la tuta verko.

Kvankam la tria parto de PAG estas proksimume same ampleksa kiel la partoj morfologia kaj sintaksa, oni ricevas la impreson ke ĉi entenas malpli da donitaĵoj kaj informoj. La konsultlibro fariĝas plurloke argumentejo, kie la teoriaj starpunktoj estas prilumataj kaj defendataj el diversaj perspektivoj kaj kie la samaj ekzemploj ripetiĝas, jen analizataj en siajn partojn, jen denove sintezataj el siaj partoj en tutajn vortojn. Kaj oni sentas, ke tamen perdiĝas la tuteca bildo: kio finfine estas ĉi tiuj Esperantaj vortoj, derivaĵoj kaj kunmetaĵoj? Kiel ili ekzistas: ĉu la plejmulto estas pretaj formaĵoj, sortimento el kiu la parolanto devas elekti, nur porokaze mem farante novan vorton; aŭ tuj post *malbona*, *malbela* kaj *patrino* komenciĝas la tereno kie la formaĵoj, kvankam ripetiĝantaj, estas ĉiujfoje rekreataj de la parolanto laŭ la reguloj konataj de li? Oni certe ne trovos absolutan respondon al tiaj demandoj, sed mi kredas, ke la derivitaj vortoj (inkluzive de la kunmetitaj) en Esperanto, kiel en la aliaj lingvoj, estas klaseblaj en jenajn kvar kategoriojn:

1. Historiaj deriva oj, kiuj ne plu estas deriva oj por la ordinara parolanto -- ekzemple *konsisti*, *insisti*.

2. Leksemi intaj (enleksikoni intaj⁹) deriva oj, kies konsistigajn partojn oni facile rekonas sed kiuj ne plu estas "libere" uzeblaj, ar ili stabili is al senco pli strikta ol tiu, kiun la partoj principe permesus. i tiu grupo estas en Esperanto tre granda, ni pensu ekzemple pri la *ej*-deriva oj kiel *pre ejo* a *necesejo*. Kiel leksemi intajn mi taksas anka tiujn deriva ojn kiuj, kvankam sence tute regulaj, estas tiel oftaj ke la parolanto ne iufoje aparte kreas ilin, ekz-e *malgranda* a *edzino*. La limo inter tiuj i kaj tiuj el la kvara grupo evidente ne povas esti strikte difinita.

3. Sintaksaj deriva oj, en kiuj la deriviloj similas al fleksiaj fina oj: ili povas esti alligitaj al iu vorto de difinita sintaksa kategorio, kaj la senco estas esprimebla per ĝeneralaj reguloj. i tiuj deriva oj respondas al certaj sintaksaj transformoj. Ekzemploj estas la an o de la vortklasa fina o (-o, -a, verbaj fina oj) kaj la *ad*- kaj *ec*-deriva oj: *la knabo kantas* -> *la kantado de la knabo*; *Svislando estas bela* -> *la beleco de Svislando*.

4. Porokazaj deriva oj, kiujn la parolanto faras por la bezonoj de iuste tiu dira o, kiun li tiusituacie volas eligi. Ili estas tipa fenomeno de Esperanto, ar oni malpli riskas diri stranga on ol en aliaj lingvoj. Ekzemplo estas la vorto *kunmetismo*, uzota pli poste en i tiu recenzo. Ne gravas u iu anta e uzis in, gravas ke mi mem nun (re)kreis in. Rimarku, ke anka la porokazaj deriva oj estas ofte sence pli limigitaj, ol la "sumo" de la konsistigaj partoj postulas: pri tiu plistriktigo de la signifo respondecas la kunteksto. En alitema artikolo *kunmetismo* povus signifi ion tute alian ol en i tiu. iu porokaza deriva o havas ancon leksemi i, almena por parto de la parolantaro. Tiel okazis lastatempe al la vorto *pracelo*, unue aperinta en la Manifesto de Ra mo.

Estas malfacile trovi en PAG spurojn de ia analoga divido. La grupoj (2), (3) kaj (4) estas neniel distingitaj. Pri la historiaj deriva oj oni tamen okupi as iom aparte, sub la rubrikoj "pse dosufiksoidoj", "pse doprefiksoidoj" kaj "pse doprefiksoj". (La historieco de tiuj deriva oj estas signita per "pse do-"; la elemento "-oid-" rilatas al aliaj principoj de PAG, kiujn ni pritraktos pli sube.) Krome, al la pritrakto de la sufikso *ism* oni aldonis iom longan noton, kie estas traktataj malfacilaj limkazoj inter la grupoj (1) kaj (2). Temas pri la sistemo de la nomoj de sciencobran oj kaj respondaj sciencistoj.

Tiu sistemo estas ja netipe komplika punkto en la morfologio de Esperanto: oni havas la tipon *filologio* - *filologo*, *etnografio* - *etnografo* (sed *telegrafo* estas ilo, kaj *fotografo* signifas 'fotografado!'), krome la tipon *fiziko* - *fizikisto*, *tekniko* - *teknikisto*, aparte la tipon *lingvistiko* - *lingvisto*, *stilistiko* - *stilisto*, kaj ankora la tipon *poetiko* - *poeto*, *terape tiko* - *terape to*, la plej maloftan. La tuta sistemo funkcias probable nur dank' al la relative granda internacieco de i tiuj terminoj. PAG proponas malpezigi la sistemon disvastigante la lastan tipon, ekzemple per *esteto* 'estetikisto', *gimnasto* 'gimnastikisto', *didakto* (ver ajne 'didaktikisto', sed por mi elvokas la nocion 'instruisto'). Kelkaj tiaj novaj formoj estus pla aj pro sia mallongeco sed al mi ajnas ke ili ne simpligas la sistemon, ar ili favoras la tipon kiu iukaze restas iom escepta en Esperanto.

Krome PAG proponas (da re petitlitere, tamen) enkonduki du novajn tipojn, *mekaniko* - *mekanisto* 'mekanikisto' kaj *historio* - *historisto* 'historiisto'. En la unua kazo oni devas postuli ke

la radiko estu almenaŭ *dusilaba*, por ne ricevi **fizo* 'fizikisto', **opto* 'optikisto'.¹⁰ ajnas al mi, ke provante malpezigi la derivaĵojn, la propono proksimigus la lingvon al e pli neaglutina terminologio, kaj ne havas ŝancojn de sukceso. PAG aludas al la principo de neceso kaj sufiĉo, kiu tamen apenaŭ estas aplikebla al unuopaj literoj, kaj al la jam establita paro *filatelio* - *filatelisto* (anstataŭ *filateliisto*). Tamen, oni renkontas ankaŭ la formon *filatelo* 'filatelio', provanta restarigi la aglutinecon, kaj aliflanke por multaj *anarkiisto* ajnas pli ĝusta vorto ol *anarkisto*, eble malpli internacia. Tamen, la proponoj kaj sugestoj de PAG sukcesas identigi interesan problemaron.

La vortfarado estas en PAG pritraktata en kvar ĉapitroj, nome **La vortkonsisto de la lingvo**, kie oni konstatas la ĝeneralajn teoriajn principojn de la priskribo; **La kunmetado**, kiu enhavas, krom la tradicia kunmetado, ankaŭ plejmulton el tio kion multaj kutimis nomi derivado; **La derivado**, al kiu do restas malpli da materialo; kaj **Kritiko de la Esperanta vortfarado**, kie oni penas doni ian pritakson de la valoro kaj rolo de tiu parto de la gramatiko.

La lasta ĉapitro, kvankam mallonga, estas eble la plej interesa, sed mi trovas ĝin ankaŭ iom anakronisma. Oni defendas simplajn (kelkfoje neologismajn) radikojn kontraŭ la emo esprimi ĉion per derivaĵoj, sed la materialo kaj argumentoj ajnas deveni de inter la mondmilitoj. Certe ne estas aŭdaca prognozo diri ekzemple, ke *kinematografejo* kaj *daktilografistino* estos "pli-malpli frue anstataŭataj" de, "eble", *kinejo* kaj *tajpistino* (p. 527). Aliflanke, ne estas trafe antaŭvidi similan sukceson por *descendi* 'malsupreniri', ĉar la romanoj de Johan Valano efiĝe popularigas *desupri*. Parenteze, la profesiaro de PAG respegulas malnovajn konceptojn pri la rolo de la seksoj: oni ne parolas pri *tajpisto*. Certe tiaj ne multas ankaŭ en la realo, tamen mirigas, ke en la longa listo de *istoj* sur la p. 457 oni konsideras la inan alternativon nur eble *amist(in)o*, *aku istino* kaj *ambrist(in)o*.

La diskuto pri la "okcidenta dialekto", iniciatita de Claude Piron, fakte neniel respeguliĝas en la prijuĝoj de PAG. Ĝi teruriĝas pro la *malgrandaj malsekaj knaboj tremantaj de malvarmo* eble Zamenhof, sed kiel kuracilon oni ne proponas tiujn de Piron sed liston de "malvort-anstataŭaĵoj" en la spirito de la *Parnasa Gvidlibro* (p. 507-508). Do, anstataŭ *malgranda*, *maljuna* kaj *malproksima* oni proponas respektive *pita*, *olda* kaj *dista / lontana*, sed pli modernaj verkistoj eble preferus *eta*, *a* kaj *fora* (kiuj estas eble pli mallongaj!). Oni ankaŭ ne mencias, ke la "parnasaj" vortoj transvivintaj ne restis simplaj sinonimoj de la mal-vortoj: ne ĉiu *malhela* nokto estas *sombra*, kaj *loza* teorio ne nepre estas *malfirma* aŭ *malstreka*. Kaj el la ĉi-lastaj grupo eble mankas *le era*, kiu laŭ mi estas tute targa vorto kiam oni parolas ekzemple pri stilo (kaj, mi konfesu, estas laŭ mi la plej bela vorto de Esperanto). Cetere, kion signifas ke "*malsufiĝa* estas vorto pli plaĉa ol *malabunda*" (p. 506)? Mi vetas, ke ne estas.

Kiel Claude Piron iam atentigis, neniu proponis "elvokivan" sinonimon por *malfacila*, kies ekvivalento en la latinidaj lingvoj hazarde estas vorto derivita. Mi suspektas, ke franco parolas ankaŭ sur la paĝo 526 de PAG, kie oni elokventas por simplaj radikoj. Ni lernas, ke "sub 'malsanulejo', oni povas egale kompreni *hospitalo*, *sanatorio*, *preventorio* ktp.", sed mi miras ĉu estus tiel danĝere pensi pri sanatorio -- ja la kunteksto ofte klarigas pri kio temas -- kaj ĉu eble ankaŭ dis pri preventorioj. Kvankam mi akceptas la terminojn *ekvinokso* kaj *folkloro*, mi ne konsentas defendon de ili per tio, ke uzante *tagnoktegaleco* (kial ne *-io*?) aŭ *popoltradiciaro* oni ne povus paroli pri *ekvinoksaj tempestoj* aŭ *tradicioj de la folkloro*. Nu, kiu uzus *tagnoktegaleco*

probable uzus *tormo* kaj ne *tempesto*, sed cetere mi ne vidas kial *tagnoktegalecaj tempestoj* estus pli neeble ol la responda finna *paivantasausmyrskyt* (se finnoj havus tiun koncepton). Kaj en la finna oni devus diri *kansanperinteen perinteet*, kion oni ja ne diras, pro la pleonasmeco -- sed pleonasma ajnas al mi ankaŭ *la tradicioj de la folkloro*, kvankam la formo ne montras tion. E malpli mi komprenas la PAG'an plendon, ke en *radiofonio* la elemento *radio-* "aludas la elektromagnetajn ondojn", en *radiofotografio* "la tiel nomatajn iks-radiojn" kaj en *radiologio* i "aludas la radiumon". Restu tajloro e sia laboro: la gramatikisto ne miksu fizikajn konceptojn! Ankaŭ mi ne estas specialisto, sed el PIV mi lernas ke la iks-radioj estas speco de elektromagnetaj ondoj, kaj mi supozas ke radiologo ne okupiĝas nur pri radiumo. (Pli problema por fizikisto eble estus la vorto *radiatoro*, kiu propre ne radias varmon sed kontakte komunikas in en la aeron.)

En la "neologisma demando" (propre la demando pri la a-tonomeco de nia vortfara sistemo), PAG la siaj kutimoj apelacias al la ekzemplo de Zamenhof. Sed oni atentu: pluraj vortoj signifitaj per *z* ne estis uzataj de Zamenhof sed devenas el la neologismaj projektoj, kiujn li proponis por diskutigi la diversajn alternativojn de la lingvo-evoluo (tion PAG ja mencias, sed ne tiras iajn konkludojn el tio). Cetere, kiam oni tralegis la tutan PAG (kion ja malmultaj faros, bedaŭrinde), la signo *z* kaj la ofta apelaciado al la modelo de *Z*. komencas jam iom tedi. Nu, eble li estas nia sola vera klasikulo? Kaj mi ripetas, ke mi admiras la riĉecon de la *Z*-a materialo kolektita por PAG -- e se mi devas ripeti miajn antaŭajn riproĉojn: oni ne indikas e la jaron e la citaĵoj, sen paroli pri la fontindikoj; kaj la citaĵoj estas ofte senaverte (kaj nefilologie) stumpitaj, kiel montras la komparo de la sekvaj ekzemploj: *mia kara, mia belo estis juna dano* (p. 397), *mia belo estis brava juna dano* (p. 448), *mia belo estis juna dano* (p. 449). Mi supozas, ke (maksimume) unu el tiuj povas esti aŭtenta citaĵo, kvankam ĉiuj portas la *Z*-signon.

La ofta apero de la brava juna dano estas kaŭzita de tio, ke *mia belo* estas unu el la ĉefaj ekzemploj pri kelkaj ĉefaj principoj kiujn PAG atribuas al la Esperanta vortsistemo. Kompreneble ĉi tiu nekutimeco estas rekonata: pri pli gravaj principoj riptetiĝas pli normalaj ekzemploj, sed denove plurloke. Oni vidas, ke tra la tuta pritrakto trakuras kelkaj ĉefaj fadenoj, certaj teoriaj starpunktoj. Do, anstataŭ konsideri la unuopajn subĉapitrojn laŭvice, mi klarigos kaj kritikos tiujn tri fadenoj, kiuj miaopie konsistigas la kernon de la PAG'a doktrino pri vortfarado.

1. "Gramatika karaktero" de radikoj

La lastatempa kritiko de tiu nocio¹¹ ne ancelis PAG. Tio estas komprenebla: kiu volus retraverki 150 paĝojn da teksto, kiu ja ne grave misrepresentas la faktojn de la lingvo? Anstataŭe, oni deklaras la doktrinon implicita jam en la Fundamento, tiel ke ĉi estas ankaŭ *netu ebla* (p. 382)! Tio ne estas honesta movo: la Fundamento ekzistas por stabiligi la lingvon, ne por difini kiel oni rajtas ĝin priskribi. Mi kredas, ke estas facile konsenti pri la priskribendaj faktoj mem. Por uzi tradiciajn ekzemplojn, ni scias ke *kombo* ne rilatas al *kombi* kiel *broso* rilatas al *brosi*. Nu, la simpla klarigo kompreneble estas, ke *kombo* devenas de *kombi*, sed en la alia paro la direkto de la derivado estas inversa:

KOMBO <- KOMBI
BROSO -> BROSI

Sed nun venas problemo, por PAG: oni ja ne rajtas havi derivadon en Esperanto. (Oni e citas tiuteman decidon de la Akademio, devenan de la komenco de la jarcento kaj plene obskuran por nuntempa leganto.) Anstata e, ni havas kunmetadon (vd. i-poste sub **Kunmetismo**). Do, *komb* estas simpla kunmeto de *komb* + *o*, *broso* estas *bros* + *o*. Por tamen indiki, ke ne temas pri sama afero, ni enkondukas la radikkarakteron: *komb(i)* + *o*, do *komb* estas "verba radiko", kaj *bros(o)* + *o*, do *bros* estas "substantiva radiko". Jen, io funkcias.

Sed kion ni nun faris? Ni decidis, ke *komb*o ne povas en iu senco deveni de *kombi* (tio ja estus derivado); anstata e, ni decidis, ke i devenas de *komb(i)*. Oni unue neas la verban devenon, poste difinas la radikon iuste kiel verban. La mia opinio tio estas nur truko, kiu kunportas nedezirindajn konsekvencojn.

Unu el ili estas la koncepto de "pleonasma fina o": *broso* havas "pleonasman" o-fina on, ar *bros* jam en si mem estas substantivo. Same "pleonasma" estas anka *kombi*, kaj *kombadi* havas e "duoblan pleonasmon", la p . 439. Foje oni tamen konfesas, ke -o havas taskon, in oni uzas "por signi la nominativon" (p . 376 kaj 429). Nu, certe i ne por tio staras sur sia loko: ja i estas tie anka en la akuzativo, kaj tute ne plendas. La -o estas uzata, ar iuj substantivoj en Esperanto, kiel konate, fini as per i. Sen i ili ne estus substantivoj, kaj anka *bros* ne povas esti iel "substantiva". *Bros* ja ne povas roli en frazo kiel vorto, sekve i ne povas aparteni al sintaksa vortklaso.

Sed, PAG argumentas, *bros* ja signifas certan objekton, *komb* certan agon. Sendube jes, kaj tial oni ja komencas la derivadon el *broso* kaj *kombi*: la nomoj de objektoj estas substantivoj, kaj agojn oni indikas unuavice per verboj. Sed oni ne povas identigi ka zojn kaj efikojn. Ne estas vere, ke "en iu alia lingvo" oni distingas la samajn vortklasojn kiel en Esperanto, kvankam PAG tion asertas sur p . 374. En iuj lingvoj oni ne distingas inter substantivoj kaj adjektivoj, en iuj aliaj adjektivoj kunfandi as kun verboj. u tio signifas, ke la parolantoj de tiuj lingvoj konceptas la mondon malsame ol ni, ekzemple ne kapablas distingi inter objektoj kaj kvalitoj, a kvalitoj kaj agoj? Tiajn tezojn oni forlasis jam anta longe. Fakte la plej "fre a" responda o por la doktrino pri "radikkaraktero" trovi as en la mezepoka skolastika gramatiko, kie la tiel nomataj *modistae* ("manier-istoj") klopodis trovi rilatojn inter la gramatikaj, sensaj kaj ontologiaj kategorioj. Iliaj klopodoj estas da re respektataj, kaj parto de iliaj rezultoj estis tre valoraj, sed ne estas tempo reveni al la mezepoka nivelo.¹²

2. Kunmetismo

La PAG, "veraj sufiksoj" estas nur *a*, *eg*, *et*, *um*, *if* (*acifi* 'igi acido'), *j* kaj *nj*; "veraj prefiksoj" estas *bo*, *eks*, *ge*, *mal*, *pra* kaj *pse do*. Parenteze, pri la eventuala memstara uzo de la i-lasta oni donas la ekzemplon *pse daj argumentoj*, sed evidente devus esti *pse doaj* por ke povu temi pri la sama elemento. Krome, diversaj radikoj povas sporade prefiksi i. Sed plimulto de la tradicia "derivado" estas pritraktata sub "kunmetado", kaj la morfemoj kiujn oni tradicie nomis prefiksoj kaj sufiksoj estas tie "prefiksoidoj" kaj "sufiksoidoj".

Mi kredas ke tiuj terminoj povas esti tute bonaj por emfazi la fakton, ke la Esperantaj afiksoj povas esti uzataj anka kiel memstaraj radikoj. Sed tio ja validas anka pri la "veraj afiksoj". Krome, mi ne kredas ke estas bona solvo pritrakti ekzemple la vorton *skribilo* "simpla kunmeto",

kvankam ja ekzistas la vorto *ilo* kaj *skribilo* aspektas analoga al *skribinstrumento*, kiu sendube estas kunmetita vorto. Sed estas latentaj diferencoj. Afiksitaj vortoj havas pli da ancoj leksemi i ol kunmetitaj: komparu *segilo* kaj *seginstrumento*.¹³ Oni ankaŭ ne kutimas konservi la vortklasan markilon antaŭ sufiksoj (oni ne diras *segoilo*, *skriboilo*), dum *segoinstrumento*, *skriboinstrumento* estas pli eblaj. Kaj mi supozas ke la normala silabigo estas *se.gi.lo*, sed *seg.ins.tru.men.to*.

PAG (p. 436) argumentas, ke oni ne bezonas vortklasan vokalon antaŭ la "sufiksoidoj", ar ili havas oportunan sonformon (komenciĝas per vokalo) kaj estas tiel ofte uzataj, ke ili rekoneblas sen peno. Krome, foje eblas uzi la vortklasajn vokalojn ankaŭ antaŭ ili (ekzemple *posteulo*, *unuaeco*). Sed la *i*-lastaj kazoj estas la ĉi mi maloftaj esceptoj (krom la menciitaj, ekzistas nur kelkaj: *vivuo*, *antaŭeni* *i*). Esence estas, ke la vokaloj ofte **ne** estas uzeblaj kvankam la sufikso povas esti malfacile rekonebla. Pro iu kaŭzo la modelo de *posteulo* ne imiteblas por distingi inter *sent/ema* kaj *sen/tema*, aŭ inter *estr/ado* 'direktorado' kaj *estrado* 'podio'. Aliflanke, se la dua morfemo estas radikoj, ĉi iam eblas uzi vokalon, kaj ofte ĉi estas uzata e antaŭ vokale komenci antaŭ radikoj (*lingvoinstruado*) -- sendube por konservi la silablimon antaŭ la dua radikoj.

Foje, se oni aldonas vortklas-indikilon antaŭ sufikso, la analizo de la vorto ankaŭ ĉi as: *lernebleco* signifas 'la eco de io kio povas esti lernata', dum *lernoebleco* povas esti nur 'eblo lerni':

*Ili diskutis pri la lernebleco de la supera matematiko.
La malriĉa knabo volis lerni, sed ne havis lernoeblecojn.*

Alternative, oni povas evidentigi la duan signifon per streketo (parole per silabdivido), do *lern-ebleco*, sed ĉi iukaze la diferenco inter la du signifoj estas facile klarigebla kiel diferenco inter vorto derivita (*abl* kiel sufikso) kaj vorto kunmetita (*abl* kiel radikoj). Kadre de la PAG'a kunmetismo tio ne eblas.

Abl estas bona ekzemplo ankaŭ pri alia neadekvata o de la kunmetisma teorio: la signifo de la afiksoj ("afiksoidoj") ne estas la sama kiam ili estas deriviloj kaj kiam ili estas uzataj kiel radikoj. *Legebla* signifas, la PAG, 'ĉi ĉi ga por esti legata' (p. 464); estas evidente, ke oni ne povus diri *abla por esti legata*. Same ĉi aliaj sufiksoj: *milionulo* aŭ *gravulo* ne havas la malatatan nuancon de *ulo*, nek *profesorino* tiun de *ino*; *usonanoj* ne estas 'anoj de Usono'; *Francujo* ne estas 'ujo de francoj', kvankam PAG tiel ĉi ajnigas (p. 459). Konataj faktoj, sed faktoj malfacile klarigeblaj, se ĉi io estas nur kunmetado.

3. Analizo per sintagmoj kaj la "vortefiko"

La koncepto de la PAG-aĉi toroj ĉi ajnas esti, ke vortfarado estas sintakso en inversa ordo (kp. p. 393-394). La libro plenas je analizoj de la tipo *homkapo* = *kapo de homo*, *prespreta* = *preta je preso*. Ofte ĉi tiuj sintagmoj vere estas perfekte bonaj manieroj esprimi la saman aferon. Sed tio ne evidentigas, kial la vortfarado ekzistas en la lingvo -- por formi novajn vortojn, poste uzotajn en la sintakso. Por povi tiel dismembrigi ĉiujn derivaĉojn en sintagmojn, PAG uzas la tiel nomatajn "regulojn de vortefiko", la ĉiuj la dua elemento determinas la "gramatikan karakteron" de la unua (tamen, oni ne celas la "gramatikan karakteron" de la radikoj mem, sed ĉi efe la fina on kiun oni devas ligi al ĉi en sintagma analizo). *Homkapo* estas *kapo de homo*, ar

substantivo iam substantivigas la anta an elementon; *prespreta* estas *preta je preso*, ar adjektivo same influas. e adjektivo oni devigas la sistemon funkcii per tio, ke oni form as la analizajn sintagmojn per la prepozicio *je*, kies esenca elasteco savas multajn lamajn analizojn. Sed beda rinde tiaj lamuloj restas multaj en la libro. Stari as anaka la principa demando: kial la elementoj de la kunmeto devas nepre havi iun vortklason? Kial i estu legebla el sinonima sintagmo? Eble *skribma ino* kaj *skribtablo* vere egalas al *ma ino de skribo* kaj *tablo de skribo* (kvankam tiuj sonas francismoj), sed mi ne vidas ion nepre substantivan en la radiko *skrib* kiam i enestas kunmeta ojn. i simple signifas certan agon -- kaj tiu ago en si mem estas nek "substantiva" nek "verba".

La kunmetismo altrudas la sintagman analizon anka al la afiks(oid)oj, e kiuj i plej malbone funkcias. Ekzemple *belulo* estas analizata kiel *belo ulo* (tiele); tiun sintagmon, kiun mi hezitus ju i gramatika, oni klarigas *belo kiu estas ulo*, *belo kiel individuo* (p . 448 kaj aliloke). Oni ne akceptas la analizon *bela ulo*, ar *ulo* estus la sola sufiksoido, kiu ne obeus al la vortefikaj reguloj (p . 449; sed fakte i ne estus la sola!). Oni anka atentigas, ke sence *belulo* ne estas identa kun *bela ulo*. Prave, sed oni ignoras la faktojn ke (i) deriva oj ja povas leksemi i, sintagmoj plej ofte ne; (ii) estas dubinde, u *belulo* signifas *belo ulo*, ar tiu nenion signifas; (iii) la analizo *bela ulo* almena montras, ke *ul* ligi is i tie al adjektivo, kion la analizo *belo ulo* efike maskas.

i-rilata problemo estas, ke la la PAG-analizo de *belulo* anka *belino* 'belulino' devus esti normala formo (i ja estus same *belo ino*, do evidente "belo kiel virino"). Sed kvankam oni jes analizas *belino*-n kiel *belo ino*, oni komparas in ne kun *belulo*, sed kun *belo* en la signifo de 'belulo' (p . 455; kaj jen denove scenejo por la brava juna dano). Analizo usta, sed neniel deduktebla el la principoj de PAG mem! (La virina afero anka cetere estas iom mistera. La la noto sur p . 455, en *virino* la radiko *vir-* "estas uzata ne en la senco *ano de la generanta sekso*, sed en la senco: *seksmaturulo*. Por signi *virecan virinon* ekzistas la vorto *virulino*".)

Finaj rimarkoj

La libron finas kelkaj indeksoj. Beda rinde mankas detala indekso de la pritraktitaj vortoj; pretigo de tia kompreneble postulus ege da laboro, sed i estus tre utila ar temas ja pri konsultlibro, kiun tralegas nur kompatindaj recenzantoj. Ripro inda estas la manko de bibliografio; oni indeksis nur la cititajn a tornomojn, sed ne la verkojn skribitajn de ili. Ekzemple, sur la pa o 505 ni lernas, ke "D-ro Sos uzis la (imitindan) familieran esprimon: *eks pri li!*", sed ni ne ekscias, u s-ro Sos proponis tian esprimon en iu gazeto, uzis in en beletra traduko a simple kriis tion post la eksi o de Lapenna.

Kaj kiel **mi** nun fermas la libron? Ne kun kondamno, iukaze. Estas vere, ke en la parto pri la vortfarado mia tono i is sufi e akra, sed efe pro tio ke mi konscias la fortecon de la atakata pozicio. La vortfaraj teorioj de Esperanto nepre bezonas reviziadon, kaj al i mi volis inciti. Male, la egale pridubindajn 14 punktojn el la fonetiko mi siatempe ne pritraktis, ar multe pli bonajn studojn oni jam aperigis aliloke. Sed PAG'on mi rekomendas sur la breton de iu esperantisto -- ne por el erpi el i isdetalajn preskribojn, sed por konati i pere de i kun la senfina vasto de lingvaj fenomenoj, kiun niaj du grandaj gramatikistoj tiel bone konas.